11-a JARO, N-o 427 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. MARTO 1935

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

AKTUALA DEMANDO : LA ORGANIZA PROBLEMO

Ne estas mirige, ke la diskutado pri la problemo, tuŝanta la principon de organizado, ne jam rezultigis definitivan solvon. Oni eĉ povas diri, ke la diskutado ne jam penetris ĝis la decidiga punkto k ankoraŭ suferas pro malklara problemformulo. Multaj miskomprenoj baras la vojon al fruktodona diskutado. Ne mankas la historiaj spertoj, tute ne ! Kvazaŭ neelĉerpebla puto la historio, precipe la plej freŝdata, malavare ofertas al la serĉemulo siajn nefalseblajn faktojn k provizas nin per verajôoj, kvankam ne tre dolĉaj, sed tamen ne korupteblaj.

Oni ne bezonas la eksterordinaran kapablon aŭdi la « internan » voĉon aŭ havi misteran senton, kiuj flustrus al ni konsilojn pri la plej bona vojo al nia socialisma celo. La historio havas multe pli raŭkan voĉon k parolas tiom laŭte, ke eĉ surduloj — oni povus pensi — devus aŭdi ĝin.

Kion do ĝi sincere komprenigas al ni ? « Viaj klasaj malamikoj larĝfronte venkis vin » — ĝi lakone diras. Ĉu ni vere estas venkitaj ? Efektive, la kreskanta faŝismo en ĉiuj anguloj de la mondo estas fakto, k grandaj, tieldire modelaj, organizoj falas kiel herbo sub la falĉilo de la kampulo. Sed, ĉu ne ekzistas ankoraŭ batalema spirito inter la venkitaj klasbatalantoj, kiel montras ĉiuloke la heroa sinteno de la Kamaradoj ? Ĉu ili ne daŭrigas sub la minacantaj paragrafoj de la faŝisma leĝaro la laboron, la organizadon ? Ĉio ĉi estas vera, nerefutebla. Nur unu sola demando stariĝas antaŭ ni, grava k neevitebla : *Kial* ni estas venkitaj ? Se ni ne solvas tiun ĉi demandon, se ni ne malkovras la *kaŭzojn* de tiu ĉi dekadenco en nia laborista movado, tiam ni ne povas esperi, ke niaj fortoj iam ajn superos tiujn de la malamiko. Ĉar ja en nia mondo ekzistas absoluta leĝo, kiu diras, ke samaj kaŭzoj sekvigas samajn efikojn. Laborante kiel ĝis nun, aplikante la samajn armilojn, starigante nian movadon sur la samajn principojn, kiuj montriĝis ne taŭgaj, mankohavaj, tiel ni vere ne povas esperi pli bonan rezultaton, ol kiun ni atingis ĝis nun. Ni povas kompari nian batalon kun tiu de armeo, kiu ankoraŭ uzas pafarkojn k sagojn, dum la kontraŭulo jam uzas maŝinpafilojn k kanonojn. Ĉu tiam sufiĉas entuziasmo, batalemo, kuraĝo ? Certe ne. La pli bone ekipita malamiko spitas al tiuj ĉi atributoj de nobla karaktero k senindulge frakasas la vicojn de tiuj ĉi herooj. Ni do devas klopodi por trovi la rimedon, kiu egalvaloras, eĉ superas tiun de la kontraŭulo.

La forto de la laboruloj troviĝas en ilia organiziteco. *Unu* estas neniu, sed *ĉiuj* estas nevenkeblaj. Analoge al tio oni povas diri : La laboruloj el unu sola lando estas malfortaj, sed unuigitaj tutmonde — neekstermeblaj. Kvankam la organiza problemo ne estas la sola, ĝi tamen havas distingan gravon neneigeblan. Nur la organizita kunlaboro de la mondproletaro kondukos nin al pli efika defendo de niaj rajtoj k fine al la venko de nia idealo. Ĉiu sukcesinta atako kontraŭ la klasmalamiko en iu lando ne povas rezigni pri la helpo de la klasfratoj ĉiulandaj. Ĉu estas necese memorigi pri la obstinega batalo de la rusa proletaro kontraŭ la blankgvardiaj bandoj subtenitaj de la kapitalistaj landoj ?

Ĝi venkis, ĉar la banditoj ne plu trovis helpantojn inter la militlacaj popoloj.

Sed kiu opinias, ke la najbaraj ŝtatoj de Hispanio tolerus venkintan revolucion en tiu lando ? La interveno de la kapitalistaj landoj, por restarigi « la ordon », estus certa. Ĉu ne la granda striko de la anglaj karbministoj estis malsukcesa, ĉar la germanaj karbministoj profitis la prosperon kaŭzitan de la grandkvanta aĉetado de karbo fare de la anglaj kapitalistoj ? Necesas konsulti pli longe la historion. La faktoj estas klaraj.

Certe ja, depost la naskiĝo de la laborista movado jam ekzistas Internacioj. Sed kian efikon povas havi tiuj malfirmaj interligoj de kelkaj partiemuloj, se la amasoj restas nekleraj pri la situacio, pri la bataloj de la eksterlanda klasanaro ? La decidoj de la Dua Internacio, ekzemple, eĉ ne estas *devigaj*, sed nur *rekomendaj* por la aniĝintaj asocioj ! Ĉiuokaze la laboristaro ne estas aganta faktoro sur internacia kampo, sed nur marioneto en la manoj de kelkaj funkciuloj aŭ almenaŭ pasiva elemento. La amaso ne havis eblon juĝi la situacion en la aliaj landoj, ĉar ĉio iris tra la plumoj de tiuj funkciuloj. Ĝi ne havis la rimedojn ĉerpi mem el la origina fonto, ĉar la lingvabaro ne estis transsaltebla. Esperanto revolucie ŝanĝis tiun staton k ebligas al ĉiu simpla laboristo kontroli la internacian agadon de siaj politikaj aŭ sindikataj funkciuloj. Sed por povi tion, la ĝisnuna organizsistemo neniom plu valoras. La aktiva kunlaboro de la proletaro necesigas organizon, kiu senpere kunligas unu la alian, trans la limoj, kiuj estas kapitalista inventaĵo historie kreskinta, sed forĵetindaj de la tutmonda proletaro. Tio validas antaŭ ĉio por la laborista esperantistaro. Kia arkaika konduto, paroli pri germanoj aŭ francoj, pri hispanoj aŭ aŭstroj ! Same sensenca kiel paroli en Francio pri bretonaj aŭ normandaj Kamaradoj. Foriginte la lingvan diferencon oni ne plu trovas distingilon inter la samsortanoj de nia ekspluatista socio.

La sennacieca organizo sendube plifortigas la solidaron inter la laboristoj k ebligas al ili aktive kunlabori en la granda tasko de la tutmonda emancipo.

H. P.

XV-a KONGRESO DE SAT EN PARIZO

3.-7. aŭgusto 1935

Adreso: SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20

3. Komuniko

KONGRESEJO. La kunsidoj de la Kongreso okazos en bela k moderna ejo « Salle ADYAR », Square Rapp (avenue Rapp), *Paris VII*, tute proksime de la Marskampo k de la Eiffel-Turo : *Metro*-stacio — subtera fervojo : *Ecole Militaire* aŭ *Alma-Marceau*. Elvagoniĝante ĉe ĉi lasta stacio, oni devas transiri la Sejnponton k trafas tiam rekte la avenuon Rapp. Elvagoniĝante ĉe « Ecole Militaire », oni devas sekvi la Avenuon Labourdonnais ĝis la placo Marskampo *(Champ-de-Mars)*, kie komenciĝas la Avenuo Rapp.

VETURPREZOJ. Ni notas la vojaĝkostojn por la ĉefaj eŭropaj urboj en fr. frankoj ; ili estas kalkulitaj por triaklasa bileto, *alira* vojaĝo ; ne kalkulita estas la rabato. Oni povas kalkuli *pri granda rabato, eble eĉ* 50 %*a* je la simplaj biletoj. *I.R*-signifas *Ir-reira bileto* sur la francaj fervojoj.

Prezo de Parizo		
al Marsejlo	172.—	(*I.R.* 274.—)
Alĝero	405.—	(*I.R.* 682.25)
Bruselo	60.50	
Amsterdamo	122.75	
Varsovio	371.—	
Riga	507.—	
Bazileo	105.—	(*I.R.* 167.50)
Zùriĥo	144.—	(*I.R.* 231.—)
Zagrebo	422.—	(*I.R.* 758.50)
Barcelono	229.80	(*I.R.* 358.—)
Lisbono	332.—	
Antverpeno	69.25	
Roterdamo	102.75	
Kopenhago	344.—	
Stokholmo	438.75	
Tallinn	551.—	
Ĝenevo	120.50	(*I.R.* 192.25)
Vieno	366.25	(*I.R.* 685.—)
Belgrado	498.—	(*I.R.* 911.25)
Valencio	296.40	
Londono	167.50	tra Bulonjo
»	182.—	tra Kalezo
»	137.—	tra Diepo (*I.R.* 226.75)
»	167.75	tra Le Havro
»	157.75	Le Havro — Southampton
Manĉestro	100.—	pliaj (*I.R.* 200.— pliaj)

La granda fervoja rabato tute ĝenerale konsentata ĉi-somere al *turistoj* venontaj al Parizo, certe instigos multegajn Gek-dojn, partopreni al nia Kongreso. Ni tion forte esperas ! Kaj ni petas ne ŝanceliĝi por sendi la *Aliĝon*, ĉar nur tiel la Komitato havos la eblon iom ĝuste pritaksi la amplekson de la aranĝo k laŭ tiu mezuro disponi la elspezojn farotajn.

KARAVANO EL NEDERLANDO. Verŝajne la holandaj Gek-doj multnombre vizitos la Kongreson. Por tiuj, kiuj havas sufiĉe da libertempo (k mono), jena vojaĝo certe havos sian ĉarmon : Per aŭtobuso de *Amsterdamo* trans Arnhemo k Mastriĥto, tra la Ardenoj al Au Bonhomme, vilaĝo en la Vasgoj (Vogezoj). De tie trans Nancy al Parizo. Revojaĝo trans Remzo (Reims) k Namuro. La karavano do travojaĝos la plej belan parton de Nederlando, Belgio k Orienta Francio. La partoprenontoj tranoktos en tendoj. Foriro el Amsterdamo : 28. julio, alveno en Parizo : 3. aŭgusto. Foriro el Parizo : 9. aŭgusto, reveno en Amsterdamon : 11. aŭgusto.

La netaj kostoj sumiĝas je 37.50 *guld*. Ne enkalkulita estas la tag- k vespermanĝo en Parizo. Enkalkulita estas la vojaĝo, tendluo, plena manĝaĵo dum dek tagoj k matenmanĝo dum kvin tagoj. Por tiu vojaĝo sin anoncis jam 25 Gek-doj. Kiuj deziras pli detalajn informojn, turnu sin al K-do *C. J. v. Veenendaal, West-Graftdijk*, Nederlando.

MATERIALO. Krom la belaj dukoloraj *Sigelmarkoj* (Prezo : 100 pecoj 5.— fr. fr.) estas haveblaj ankaŭ *Kovertoj* po 50 ekzempleroj por 6.— fr. fr. k *Leterfolioj* po 50 ekz-oj por 8.— fr. fr. kun speciala surpreso k kliŝo okaze de la Kongreso.

O.K.K.

ĈE LA LABORISTAJ ESPERANTO-ASOCIOJ

En la februara n-ro de « Lab. Esperantisto » (Amsterdamo) aperis la Jarraporto de la Nederlanda LEA, prezentota al la venontmonata Kongreso de la Federacio, kiu okazos paskon en *Groningeno*. Ni ekstraktas jenajn interesajn notojn : Fondiĝis dum la pasinta jaro 20 novaj Sekcioj, 1 estas eksigita (en Ostendo), 3 malfondiĝis. La Fed. havas sume nun 96 sekciojn kun 2.758 membroj ; al tiu nombro aldoniĝas 85 izol-membroj, 18 simpatiantaj membroj k 26 simpatiantaj organizoj. En 7 jaroj la Fed. grandiĝis de 75 anoj ĝis 2.887, kun ĉiujare regula kreskado.

Pri *kursoj* ktp. estas jenaj (nekompletaj) ciferoj : 183 kursoj kun 4.350 anoj, 64 daŭrigaj kursoj, 23 infankursoj, 33 propagand-kunvenoj, 73 ekspozicioj. La nombro da « komencantaj » kursanoj plialtiĝis je preskaŭ 1.000 kompare kun la antaŭjaro. La kursoj plej grandparte okazas laŭ « gramatika » metodo, tamen 28 estis gvidataj laŭ rekta metodo. La kursanoj ricevis je favorprezo abonon al « Lab. Esperantisto » por trovi la kontakton kun la organizo.

Dekfoje dum la jaro aperis *Gazetserva* Bulteno, kiun utiligis grava parto el la nederlanda gazetaro. Ĝenerale tiuj komunikoj rilatis la progresojn de esperanto. Krom la daŭra *propagando* okazis t.n. « Verda Monato », kies unuafoja sperto montriĝis tre valora. La Fed. eldonis ankaŭ grandskale propagandmaterialon (flugfoliojn, propagandn-on de la gazeto, broŝuron, flagojn k flagetojn). Pluraj sindikataj sekretarioj konsentis oratori por esp-o, k speciale dum la Verda Monato. Antaŭ la VARA-mikrofono parolis K-do Faulhaber k unu el la varbitaj neesp-istaj oratoroj, parlamentano. Neniam okazis tiom da *ekspozicioj*, por kiuj la materialo regule estas revizita k provizita per freŝdataj gazetoj ktp. La libroj de *vojaĝantaj bibliotekoj* estis multe legataj.

Aperis porinfana gazeto « La Vojo », parte holandlingva k entenanta esp. kurson, kies bezono estis tre sentata, ĉar la infankursoj ne donis ĝis nun la deziratajn rezultojn. Krome aperis nova grava eldono : studorgano « La Progresanto ». La aranĝo kun SAT pri deviga abono al « S-ulo » « estas tre kontentiga, k ni spertis de multaj flankoj, ke la Fed.-anoj ĝenerale tre ŝatas ĝin. »

Sekretariejo k libroservo nun troviĝas kune en speciale por tiu celo luitaj ĉambroj. Per streĉa laboro la estraro sukcesis certigi la regulan funkciadon de la Libroservo. La plej grava eldono dum 1934 estis la studverko de F. Faulhaber : « Tra la Labirinto de la esp. Gramatiko » (holandlingvaj klarigoj), kies unua eldono, 1.000 ekz-oj, preskaŭ elvendiĝis dum unu jaro. En kunlaboro kun SAT aperis « Absolutismo » (parolado de Lanti). Krome estis eldonata propagandbroŝuro de K-do G.P. de Bruin.

La interrilatoj kun SAT estis daŭraj k kontentigaj.

POR ŜTOPI LA BREĈON

33. listo

3-a sekcio Roterdama FLE, kolektita okaze de distrikto-tago Sudholando, por kafo oferita al la gastoj	3.36	h. gd.
C. v. d. Meulen, Amsterdamo	1.50	»
18 334	6.75	fr. fr.
J. Flottes, Paris	9.—	»
G. Syversen, Løten	6.25	»
W. Burgemeister, Amal	9.80	»
Eerdmans-Roterdamo (ADLEL-resto)	11.50	»
Postema, Hoek v. Holland	5.—	»
H. Oosthoek, Vlissingen	8.—	»
E. Artigas, Zaragozo	1.—	peseto
A. Roosling, Zeist	10.—	fr. fr.

POR NIA KONGRESO

Fervojista sindikato patronadas la fervojistajn kongresontojn

La modela k pionira laboro de la Sindikato de Ŝtatfervojistoj (Maldekstra bordo de la Sejno C.G.T.) en Parizo jam ofte montris sian aktivecon sur internacia kampo per regulaj vojaĝoj de sindikatanoj al eksterlando, tiel kreante intiman kunlaboron kun siaj laborkolegoj en aliaj landoj. La Ĝenerala Kunveno, vizitita de proks. 200 sindikatanoj, laŭ propono de K-do H. P., unuanime akceptis la patronadon de la fervojistoj venontaj al la SAT-Kongreso en Parizo k tiucele intencas aranĝi oficialan viziton al la ĉefaj parizaj stacidomoj k apartan grandan kunvenon por la fervojistoj diversnaciaj kune kun iliaj francaj kolegoj. La kunveno estos bone aranĝata, en solena maniero, verŝajne kun prezentado de filmo k ceteraj interesaj programpunktoj. La multfoje manifestita serioza laboro de la sindikato garantias, ke la fervojistoj renkontos bone organizitan k fratecan akcepton.

Estas evidente, ke la kunlaboro de tiu ĉi sindikato donas aparte gravan aspekton al nia Kongreso. Ĝi estas unu el la ekzemploj, kiuj montras al ni la vojon al sukcesigo de nia Kunvenego k samtempe ebligas nin porti nian ideon pri la neceso de nia lingvo inter vastajn rondojn el laboristoj. Tiun ĉi ekzemplon devas sekvi ĉiuj K-doj, kiuj iel povas instigi sindikatojn al simila sinteno. La enlandaj sindikatanoj multe profitos per la raportoj farotaj de la diverslandaj sindikatanoj pri iliaj laborkondiĉoj k aliflanke, la francaj sindikatanoj ne-esperantistaj unuafoje ekspertos la gravon de internacia lingvo.

Por ke la entrepreno havu kiel eble plej brilan sukceson, estas necese, ke la fervojistoj partoprenontaj nian Kongreson, sin anoncu kiel eble plej frue k indiku, ĉu ili povas paroli en la nomita kunveno. La anoncoj estu farataj al la OKK sub la adreso de SAT. Ili regule estos informataj pri la preparado de la fervojist-sindikata aranĝo.

H. P.

Komunikoj de la Plenum-Komitato

Konforme al la paragrafo 11-a de la Statuto ni sciigas al la SAT-anaro, ke la mandato de la nuna P.K. finiĝos kun la fino de la kuranta jaro. Anoncante tion, ni atentigas la membraron, ke ĝis la Kongreso (en aŭgusto en Parizo) ĝi havas la rajton starigi kandidatecojn, kiuj estos diskutobjekto dum la Kongreso.

* * *

Ni direktas varman alvokon al la Gek-doj je la favoro de « Sennacieca Revuo », kiu meritus pli grandan subtenon de la flanko de multaj « S-ulo »-abonantoj. Granda nombro ne opinias necese aboni al la dua k pli ampleksa organo de SAT, kia estas « Senn. Revuo ». Kompreneble ni ne turnas nin al mizerstataj K-doj per tiu ĉi peto, sed ni havas la konvinkon, ke iom pli intensa propagando por « S.R. » farata de la grupgvidantoj (ekzemple en Nederlando), povus havigi al nia Revuo ankoraŭ plurajn centojn da abonantoj, kiuj permesus al ĝi pli facilan vivon laŭ financa vidpunkto. La prezo, precipe por membroj, estas nealta kompare kun la materialo ĉiumonate prezentata en « S.R. », kiu ankaŭ estas ilustrita. La respondon ni atendas per poŝta ĉeko aŭ mandato.

Pri Kunlaborado

Montriĝas tro da hezitado, eble eĉ da timemo ĉe la Gek-doj rilate kunlaboradon al niaj revuoj, tiel al « Sennaciulo », kiel al « Sennacieca Revuo ». Ĉio koniginda el la esperantista vivo estu raportata por « S-ulo » ; ĉio interesa por tutmonda legantaro rilate la socian k politikan vivon, rilate ekonomion, vivnivelon, laboristajn batalojn kc. estu priskribata por « Senn. Revuo ». Rilate ĉi lastan taskon ni volas precizigi, ke ne temas traduki tekstojn el gazetoj laŭvorte, *sed, — se naciaj gazetoj estas utiligataj por la verkado, ili estu utiligataj nur por ĉerpi ciferojn, informojn, notojn, per kies helpo la verkanto mem kompilu interesan artikolon, aldonante siajn proprajn sugestojn, spertojn k eventuale analizon...*

Ni diras tion, ĉar tro ofte ni ricevas skribaĵojn ne sufiĉe bone prilaboritajn k tial multfoje ne aperigindajn. Kelkfoje ankaŭ oni raportas pri negravaĵoj, kiuj ne povas interesi tutmondan publikon. Kompreneble ankaŭ ne estas interese por la K-doj legi pri okazintaĵo, kiu estis jam larĝe pritraktita de la ĉiutaga gazetaro k tial estas konata de ĉiuj. Se oni tamen volas paroli pri tiaj eventoj, oni traktu ilin laŭ personeca k tial aparte interesa formo, donante al ili per tio valoron, kiun ili ne havis per la pure informa prezentado en la ĉiutaga gazeto aŭ nacilingva revuo.

Rilate la esperantistan k SAT-an vivon, oni rajtas prezenti ĉion, kio povas interesi aliajn Gek-dojn, sugestojn, instigojn, kritikojn, k se estas problemoj nesolvitaj, oni provu alporti al ili solvon, persone kontribuante al la debatoj k diskutoj.

La aktiveco de la spirito en la Asocio montriĝas per vigla kunlaborado al la gazetoj. Pripensu tion la aktivuloj k oferu kelkajn horojn, por verki trafan k presindan artikolon, post antaŭa zorga kolektado de la materialo, kiu servu kiel bazo al la skribaĵo !

La Redakcio.

EL NIA LETERUJO

La virino en Sovetio.
Sindikataneco.

K-do W.V. (17040), Anglio, sendis al ni kopion de letero de laboristoj el la 2-a ŝtata presejo en Sebastopolo, el kiu ni ĉerpas jenon :

« La granda Oktobra Revolucio liberigis nian virinon k donis al ŝi ĉiujn civitajn rajtojn. Ĉe ni ne ekzistas laborbranĉo, en kiu ne laborus la virino. Same la poligrafia industrio ne prezentas ĉi-rilate escepton. Ĉe ni estas kompostistinoj, presistinoj, bindistinoj. La virinoj laboras en zinkografio, en litografejoj, ĉe rotaciaj k aliaj modernaj maŝinoj, ne nur kiel helplaboristinoj, sed ofte kiel respondecaj fabrikmajstroj. Ekz. en la ĵurnalfako de nia presejo laboras virino kiel laborbrigadestro, juna laboristino, kiu dum sufiĉe mallonga tempo konsiderinde plialtigis sian kvalifikon. La salajrokategorioj k salajrotarifoj de popeca laboro por la viroj k virinoj estas ĉe ni egalaj.

« En nia presejo la virinoj konsistigas 60 % el ĉiuj laborantoj. Ĉiuj estas sindikatanoj ; ĉe ni ĝenerale ĉiu laborulo ne konsideras sin ekster la vicaro de la sindikatoj. Se la sindikatoj en kapitalistaj landoj metas kiel sian taskon preskaŭ ekskluzive la defendon de materiaj interesoj de siaj membroj, tiam en Sovetio la stato estas tute alia... Nia devizo estas : « La sindikatoj estas lernejoj de komunismo ». Kaj se ĉiuj laborantoj 100 %-e estas sindikatanoj, do tio plifaciligas al niaj sindikatoj konduki grandan laboron rilate komunisman klerigadon de laborulamasoj, rilate plialtigon de ilia teknika scipovo, rilate ilian altiron al socipolitika laboro, por forĝi el ili bonajn produktantajn soci-agantojn, kiuj indas sian bonegan patrion.

« ... la sindikataniĝo ne estas deviga. Neniu rajtas devigi laborulon, ekster lia deziro, sindikataniĝi. Rilate la salajron k aliajn laborkondiĉojn, sindikatanoj k nesindikatanoj havas en USSR samajn rajtojn... »

Por toleremo

K-do B.W. respondas al K-do Oskam, kiu kritikis lian artikoleton « En ĉio Naciismo », interalie :

« ... laŭ raporta flanko mia artikolo estas tute vera ; K-do O. ne rajtas paroli pri trompa artikolo ... Krome

mi ne povas konsenti, ke K-do O. miksas SAT en la diskuton. Ni neniam forgesu, ke nia organizo tute ne respondecas pri la artikoloj aŭ koncceptoj de la membroj. SAT ja ne estas unutendenca organizo, en kiu la Gvidantaro k Redakcio sugestas la membrojn havi iliajn konceptojn. Ĉu mi troigas, dirante, ke eble la organoj de SAT estas la nuraj en la mondo, kiuj estas je la dispono de la membraro ? La SAT-organoj estas plenvorte *laboristaj* gazetoj. ... Ni ne malkontentiĝu pri SAT, kiam ni legas en ĝiaj organoj artikolojn, kiuj ne havas nian aprobon. »

Minist-sindikata sekretario aliĝas al SAT.

Aliĝante al SAT, nordfranca minist-sindikata sekretario skribas i.a. al ni : « ... Nu, mi admiras la pozicion ĝustan k preskaŭ heroecan de SAT en la mezo de l'furiozantaj pasioj. Mi volus do alporti ankaŭ mian modestan partoprenon en tiu ĉi nobla tasko entreprenita de SAT... »

Tre kuraĝiga k gratulinda estas tiu ĉi sinteno de sindikata funkciulo en tiel grava organizo, kiel la minista el la Kaleza regiono. Ke ĝi trovu imitantojn multloke, k nia afero antaŭenpaŝos laŭ senmezure pli grandaj proporcioj...

Kursgvidanta Praktiko

Estas interese foje trakti kritike la demandon, kiun rolon ludu la socialismo (politiko k klasbatalo) en la kurspraktiko.

Certe ĉiu el ni povos konsenti, ke la ĉefa tasko de la esperanta kurso estas, instrui en sukcesa maniero esperanton. Ni eduku kapablajn esperantistojn k havigu, se eble, novajn membrojn por la organizo.

Kiel oni povas atingi tion ? Ĝenerale estas necese, ke kursgvidanto esploru la pensmanieron de siaj kursanoj ; laŭ ĝi li elektas la ekzemplojn, per kiuj li demonstras la lingvon.

Se li gvidas kurson, kies anoj akordas kun liaj propraj idealoj, ne nur rilate politikon aŭ ion similan, tiam li povas utiligi tiun staton, sed se inter la lernantoj ekzistas diversaj opinioj aŭ li mem ne samopinias kun ili, tiam estas dezirinde, ke ĉio estu evitata, kio efikas ofende aŭ trude.

Plej ofte la personoj en nia kurso estas laboristoj, sed mankas al ili la tipa klaskonscio. Estas scivolemo k ofte nur neprofunda intereso, kiu ekestis pro ia propagando k kiu instigas ilin al lernado. Preskaŭ neniam mi renkontis personon, kiu lernis esperanton pro tiu motivo, ke li (ŝi) estas socialisto. Lerta gvidanto provas en tiu kazo veki la prisocian konscion. Eble li povos instigi tiajn indiferentulojn, ke estas interese okupiĝi pri la problemoj de l'socio.

Estas studrondo pri *esperanto* k *ne* pri *socialismo*. Kiam ni preferas socialistan tendencon en la lernolibro, tiam ni faras tion pro tio, ke la kurso iĝas tiele pli interesa. Sed la aŭtoroj de lernolibroj aperintaj en laboristaj eldonejoj tro ofte eraris k neĝuste komprenis la psikon, kiam ili per radikala, ja eĉ fanatika maniero montris en la libroj la vivon sub ia « nenatura » masko.

Skizante en lernolibro aŭ kurso la socian vivon, oni faru tion en taktoplena maniero : la grandaj ĝeneralaj idealoj de l'homaro devas esti nia gvidilo. Pli grave estas veki en la kursanoj la pensemon k kritikemon. Tiu singarda sinteno ŝajnas necesa por instrui al tre multaj homoj esperanton k tiel krei favoran publikan opinion por la lingvo.

Mi opinias, ke estas malaprobinde instrui laŭ jena maniero : Ekz. « Hitler estas kanajlo ». Tio ŝajnas al mi tro profana. (Ĉu la verkinto vere celis diri « profana » ? Aŭ ĉu la ĝusta esprimo ne estus « vulgara » ? — *Red.*) Kiel laboristoj ni ankaŭ celu al pli alta nivelo de nia sentaro. Se oni elektus la formon : « kelkaj opinias, ke Hitler estas barbaro », oni esprimus la saman fakton, sed per pli konvenaj vortoj k ne limigus la diron al tendencanoj. Sur kiel eble plej larĝa bazo ni starigu niajn kursojn. Simile lerta gvidanto rilatas al religio. Ni ne prezentu aserton, ekz.

En sia marta kajero

SENNACIECA REVUO

revuas pri Italio k ĝiaj kolonioj, Britio, Francio, Germanio, Sovetio, ktp, kc.

Ĝi prezentas krome svedan, hungaran, ĉinan k. c. literaturon k interesan artikolon pri geografia esplorado.

16 paĝoj. Ilustrita. Ponumera prezo : 2.25 *fr.* Jarabono sur la bazo de 25.— *fr.* por nemembroj.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

Planimedo verkas artikolon por « Nia Bordo »

Planimedo estas centprocenta verdstelulo. La esperanta movado plene absorbis lin, k en la Laborista Esperantista Grupo li pasigas siajn plej belajn horojn. Tamen iafoje ĉagrenas lin profunde la konsideroj de iuj membroj de la grupo, k li konstatas kun bedaŭro, ke la grupa vivo povus esti pli harmonia k pli ideala, se ne estus tiuj ĉagrenaj makuloj sur la suno. Feliĉe, ekzistas grupa bulteno « Nia Bordo », en kiu ĉiu grupano rajtas esprimi siajn pensojn k eldiri ĉion, kio ŝarĝas lian koron. Planimedo unuafoje profitas la okazon. Li provas transfluigi en sian plumon ĉiujn tiujn pensojn, kiuj afliktis lin dum la kunvenoj. Estas malfacile por li verki ; li estas manlaboristo k la plumo en lia pugno ŝajnas al li pli peza ol la pioĉo. Tamen li volas uzi sian rajton, k tial li venkas ĉiujn barojn k obstaklojn.

Jen, kiel plendas Planimedo : « Ho, necesas tion diri, miaj amikoj, multaj el vi estas veraj netolerebluloj, viroj k virinoj ! Ĉu do la verdstela medio, la verdstela lingvo, la verdstelaj pioniroj influis vin tiel, ke vi estas devigataj riproĉi al mi, kiu simplule grandiĝis inter ordinaraj homtipoj, pro mia vulgarhoma konduto ? Jen iun tagon la vegetare vivantaj membroj de nia grupo, post konspira kunsido invadinte la grupejon, mallaŭdis min pro tio, ke mi manĝas bovaĵon k kolbasetojn ; ili diris al mi severtone, ke tiaj moroj ne indas en niaj elitaj rondoj.

« Alian vesperon, kiam la vegetaranoj malmultnombre ĉeestis la kunvenon, la fumuloj triumfmiene ellasis siajn haladzojn en la ĉambron, k kiam mi rifuzis amike prezentitan cigaredon, ili mokis pri mi, nomis min nevireca, duon-idiota ktp. Unu el ili eĉ asertis al mi plej seriozmiene, ke la esperantista popoleto konsistas je 95 % el strangeguloj, maniuloj, nenormaluloj, k ke fine venis la horo, kiam la normalaj verdstelaj homoj ne plu povus ridindigi sin ĉe la ekstere starantaj personoj k devus agi por sin liberigi el la tirana superregado de la sektemuloj — tiuj ruinigantoj de la tuta movado. Reformo ĉe la radikoj mem estas bezonata, ĉi tiu K-do kriis, laŭtigante subite sian voĉon. La malmultaj ĉeestantaj gestranguloj, kiuj aŭdis tiujn vortojn, kuraĝis protesti kontraŭ la parolinto : ili elmetis la opinion, ke ĝuste ili mem, pro tio ke ili noblanime rezignadas pri la vulgaraj kutimoj k misuzoj, estas la veraj disĉiploj de la Zamenhofa idealo, ĵurinte je la Bulonja deklaracio, en kiu estas difinita la normaltipo de ideala esperantista paca batalanto...

« Mokrido superŝutis la tiuvesperajn malplimultanojn, kiuj sekrete promesis al si venĝi sin proksimkunvene per pli multnombra ĉeestado. Sed ĉu tiu situacio estas tolerebla en nia grupo ? Ĉu el tio ni trovos ireblan elirvojon ?

« Ni rigardu la neŭtralulojn ĉe iliaj kongresoj, rimarkigis ankoraŭ unu el tiuj grupanoj, kiuj dubis pri la duon-kreteneco de 95 % el la esperantistaro : ĉu ili ne tute laŭmode k

« Religio estas opio », sed ni demandu : Ĉu vi vidis iam anĝelon, Dion ? Tiel oni ne ofendas aŭ trudas, sed instigas al pensado.

Nia celo devas ĉiam esti, helpi al plinobligo de l'homaro, — ne nur de la laboristaro. Esperanto estas rimedo al tiu celo, k tial ni uzas ĝin. Kaj ĉar esperantisto ordinare pli facile liberigas sin de naciaj antaŭjuĝoj k povas rigardi la mondon kiel tutmondano, tial ni helpas konstrui tiele la fundamenton por tiu idealo : Tutmonda socialista mastrumado...

Ĝenerale ŝajnas al mi ne rekomendinde aranĝi amaskursojn kun 50 k pli da lernantoj. La instruanto perdas la individuan kontakton k la kontrolon pri la anaro. Sufiĉas 20-30 personoj. Estas erare tro multe fidi al studemo k komprenkapablo de l'partoprenanto. Plej grava estas la praktikado de la lingvo, k tio eblas nur en kurso kun meza nombro da anoj.

La instrumetodoj varias inter nura apliko de esperanto k ĉefa instruo per nacia lingvo. Laŭ mia sperto oni uzu kiel eble plej multe esperanton, sed komparu ĉion kun la nacia lingvo, ĉar ĝi estas la fundamento. Instruate nur per esperanto, la lernanto ricevas malklaran bildon pri la gramatiko. La ĉefa instruado per nacia lingvo povas efiki teda. Estas utile por konduki al pensado per esperanto, se oni povas lernigi la novan vorton pere de la antaŭe jam lernitaj.

16 936 (*Profesia esp. instruanto*).

Memornoto

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Smaalenenes Socialdemokr.*, 8.1., *Sarpsborg Arbeiderbladet*, 28.1., *Signalen*, Stokh , 7., 14., 21., 28.2., *De Fakkel*, Amsterd., 15.2., *Pensamento*, Lisbono, feb. (rubr.), *Juda Esp-isto*, n-o 2 (feb.), Vilno. aldono al judlingva gazeto « Etiuden ».

PRI LA SAT-KONGRESO (VALENCIO) : *Nelson Leader*, Nelson (dato ?).

PRI SAT : *Lokomotivmannens Tidning*, Stokh., 1.3., tre bona artikolo pri nia laboro.

Tra la Esperanta Gazetaro

Por forigi iluzion...

En « Esperanto » n-o 1 de januaro 1935 respondas s-ro *Movo* (Parizo) al artikolo de *Lidja Zamenhof* :

« La aŭtorino deklaras, ke ankaŭ niaj propraj vicoj enhavas ŝovinistojn k naciistojn. — La lingvo do ne kapablis forigi, nuligi tiun fenomenon. En Bulonjo la atmosfero ja estis tute frateca, tute amoplena. Tamen ni ne scias, ĉu la lingvo faris la ĉeestantojn pacifistoj, aŭ ĉu la ĉeestantoj ĉeestis tie, ĉar ili jam antaŭe estis pacifistoj. »

Ŝajnas al mi esti certa, ke ili jam antaŭe estis pacifistoj. La homo starigas antaŭ si celon k poste serĉas la rimedojn. La idealisma, pacema spirito de la unuaj pioniroj de esperanto erarigis Zamenhof, kiu atribuis al esperanto misteran konvertan forton k nomis tion la « Interna Ideo ». La ideoj estas en la homoj, kiuj servigas al ĝi rimedojn, k unu el tiuj estas esperanto.

La veraj malamikoj de la esperanto-movado

S-ro *L. Thevenin* sagace sekvas la postsignojn de la veraj malamikoj de esperanto k — malkovris ilin : En « La Tribune Espérantiste », n-o 18, li komunikas al la miranta homaro :

« La granda danĝero kuŝas en tio, ke tiuj malhelpantoj troviĝas ĝuste en nia esperantista tendaro :

« Ili ne estas tiuj samideanoj, kiuj pensas, ke esperantismo estas sinonimo de neŭtraleco, sed tiuj, kiuj malprudente metis la verdan stelon.. sur la ruĝa standardo de la revoluciaj organizoj. »

Klara lingvo, sed tamen konfuza penso. Ĉu la *celo*, por kiu ni uzas esperanton, ŝokas s-ron Thevenin ? Sed ni ne estas kulpaj pri la fakto, ke profitavidaj homoj subpremas la rajton de la laborista klaso. Ĉu esperanto ne trovis vastan rondon da adeptoj inter la laboristaro dank' al la ekzisto de laboristaj organizoj ? Kaj fine, ĉu s-ro Thevenin postulas de laboristoj, ke ili kantu kun li la naciajn himnojn okaze de burĝaj kongresoj k levu la brakojn por saluti siajn buĉistojn ?

Stranga invito.

En « Franca Esperantisto » n-o 13 s-ro *P. Petit* okupiĝas pri la problemo aligi ĉiujn landajn asociojn al UEA k vidas kiel lastan problemon tiun :

« Tiu problemo estas la aliĝo de la landa asocio de USSR (SEU). La Sovetia diplomatio jam trovis la vojon al Ĝenevo per la Ligo de l'Nacioj. La gvidantoj de SEU verŝajne baldaŭ a. .u trovos la saman vojon (ne al LDN. kiel oni poste vidas, *H. P.*).

« Kora invito de SEU-anoj al niaj universalaj kongresoj, k ĉefe al nia jubilea kongreso... en Varsovio en 1937 ; ebla organizo de postkongreso en Moskvo, jen estas la vojo, kiu alproksimigos SEU al UEA. »

Kaj kial ne invito jam nun, por la kongresoj en 1935 k 1936 ? Nu *Romo* k *Vieno* ne estas konvenaj neŭtralujoj ! Dum tiuj jaroj sekve la sinjoro iras sola k la edzino restos hejme. Cetere — iom ĝena invito !

Fine de sia artikolo, s-ro Petit anoncas :

« Proksiman monaton mi ekzamenos kun sama unueciga volo la rilatojn de UEA kun la faka k laborista movadoj, k provos montri, kial la Lanti-krio « For la neŭtralismon ! » estas grava danĝero por la tuta esperanto-movado k eĉ por la ideo mem de lingvo internacia. »

Do, ĝis la proksima monato ! *H. P.*

Mi volas vendi profite al la *Sennaciista Frakcio*

LAROUSSE UNIVERSEL

2568 paĝoj ; formato : 21 × 30 cm.

Tiu fama franclingva enciklopedio estas riĉe ilustrita k la du volumoj estas preskaŭ en stato kiel en ilia aper-tempo : 1923.

Interesiĝantoj bonvolu sin turni kun proponoj al :

ESPERANTO, 14 avenue de Corbéra, *Paris (XII-e).*

laŭ la kutimoj de nia tempo kondutas ? Ili aranĝas grandiozajn kostumbalojn, en kiuj ili amindumas laŭ tute normala maniero, poligamie k eksedziĝeme... ili konsumas likvorojn k aperitivojn, laŭ la modelo de Remondo Ŝvarc, estro de la verdstelaj Piratoj... ktp, k.a.

« Mi, Planimedo, sincera verdstelano, estas naŭzita pri tia grupa interbatalado, ĉar mi estas konvinkita, ke nek mia nefumemo unuflanke nek mia kadavromanĝemo aliflanke havas iajn ajn rilatojn kun mia esperantisteco. »

Tiel abrupte finis sian artikolon Planimedo, k neniu redaktoro kuraĝis aldoni komentan noton. Tamen tion prizorgis la grupa prezidanto en la proksima kunveno, kie la legado de la Planimeda produktaĵo elvokis fortan impreson. Li diris interalie (laŭ la protokolo de la sekretariino) : « Mi insiste petegas la Gekamaradojn, la fieran sekvantaron sub la verdruĝa standardo, ne forgliti sur la ŝliman vojon de la esperantista neŭtralismo, kiel faris tiu bonintenca zamenhofano, kiu prezentis kiel normal-esperantistojn la dancantajn UEA-parojn ĉe mondkongresoj de flirtado k aperitivtrinkantajn longvivulojn. Ni grupigas en niaj rondoj homojn el proleta medio kun vivnivelo kondiĉita per atrofiaj salajroj submetitaj al ada k nehaltema reduktiĝo... Se al niaj stomakoj ne estas permesite digesti luksajn frandaĵojn nek al niaj postaĵoj ripozi sur silkaj kusenoj, la afero tamen estas tute alia rilate al niaj spiritoj : la plej riĉa spirita nutraĵo ne estu sufiĉe bona por ni, k ĉirkaŭ la plej profundaj temoj de la homa pensado turniĝu niaj debatoj... Kaj tial ni ne diskutu, ĉu K-do Planimedo preferas fiŝon al viando, k K-do Strunko legomojn al fruktoj, aŭ ĉu K-do Malverda fumas diskrete en sia angulo cigaredon. Ni lasu la nudistojn esti nudistoj k la frakvestitojn resti frakvestitoj. Nur la akuzativ-pekulojn ni ne lasu en ilia kompatinda stato ; ni pacience k senlace prilaboru ilin, por ke ilia ĝena manko fine malaperu, por la honoro de la inventinto de esperanto... »

Tiun paroladon multe aplaŭdis la frakvestitoj k la nudistoj, la diskretfumuloj k la vegetaranoj. Nur la akuzativ-pekuloj mallevis honteme k ŝajne rezignacie siajn kapojn. Tamen Krispulino, unu el la pekuloj, post venko de sia embaraso, rektigas la kapon k surlipigas sarkasman rideton, pensante ĉe si : — « Jen ankoraŭ fantomas la neŭtralismo inter ni... Anstataŭ : Vivu la Socialismo ! jen nia prezidanto krias : Vivu la korekta lingvo-uzado !! Kiun rilaton tio havas al nia klasmovado ? »

La K-do prezidanto divenis la penson de Krispulino k diris milde : « Same, kiel malfacile vi iam lernis ne malsekigi la littolaĵon k lernis lavadi viajn manojn k ceterajn korpopartojn, tiel pli facile vi lernos uzi korekte la akuzativon en esperanto... Kaj se ni estas batalantoj por la aplikado de esperanto en la laboristaj medioj, do ni batalas samtempe por tio, ke ĝi estu uzata de la proletoj korekte k nekripligite, nek stumpigite. Ni volas surrajdi elastan saltulon k ne laman ĉevalaĉon... » **Nubo.**

EL LA VIVO DE LA FRAKCIOJ

Bolŝevist-Leninista Frakcio en SAT.

Sub tiu ĉi titolo fondiĝis nova Frakcio, kiu celas « la propagandon de la Kvara Internacio » inter la anoj de SAT, do « la propagandon de la bolŝevismo-leninismo aŭ revolucieca komunismo-sennaciismo ».

La adreso de la Frakcio estas : *Tage Lau*, Kjeldsgaardsvej 33 I, *Kopenhago*, Danio. Oni petas *ne* skribi sur la koverton la nomon de la Frakcio aŭ de SAT, pro politikaj kaŭzoj.

Noto de la Redakcio: La propagando por politika organizo inter la membroj de SAT ne estas malpermesata, sed tiucele komprenble ne povas servi la organoj de la Asocio. La vojon de tiaspeca disvastigo devas trovi la Frakcioj mem. Enkondukante ĉe ni la disputpunktojn, kiuj disigas la partiojn k sindikatojn, ni baldaŭ spertus ĝeneralan malkontenton k malutilon al SAT. Tiurilate ni dezirus koni la opinion de la membraro k petas, ke oni konigu al ni sian vidpunkton rilate al la taskoj de Frakcioj, k rilate al la neceso de ilia ekzisto. La Kongreso sendube devos debati pri tiu ĉi grava punkto.

Ekster nia movado

Jarraporto de la Brita Esperanto-Asocio.

En « The British Esperantist » aperis raporto pri la pasinta jaro, el kiu vidiĝas la progreso de esp-o en Britio inter la neŭtraluloj. La membraro nombras sume 2020, t.e. 298 pli ol la antaŭan jaron. La nombro de aliĝintaj grupoj atingas 88, k de regionaj federacioj 14. La librofako same donis pli grandan profiton, sed malgraŭ la pli bona financa situacio BEA ne povas rezigni pri la kutimaj subtenoj donataj de garantiantoj. Dum 1934 la Asocio kolektis la konsiderindan sumon de 554 funtoj, krom la kurantaj kotizoj. S-ro Butler vizitis 80 infanlernejojn, kie li donis provlecionojn al kelkmiloj da infanoj k al iliaj instruistoj. Oni ne mencias ĉi-jare la nombron da lernejoj, kie es-po estas instruata, sed laŭ s-ro Butler vekiĝas granda ĝenerala intereso ĉe edukaj instancoj. (Interesi la registaron k provincajn eduk-instancojn — bone, sed se oni havus sukceson, mankus kapablaj instruistoj. Tial estas necese direkti tien la propagandon. — *A.*) Rilate al BBC (Brita Disaŭdiga Korporacio) ĉia provo interesi la ĉefojn malsukcesis. La pagita disaŭdigo el Luksemburgo de BEA kostis 65 funtojn ; la rezultato estis vendado de kelkmiloj da lernolibroj. 150 novaj membroj aliĝis la Asocion pro la konkurso kun du premioj da senpagaj vojaĝoj al Romo ĉi-jare.

Aldworth (18876).

Ĉe la Maristoj

La Marista Ligo Esperantista (sekretariejo en Svedio) laboras sufiĉe vigle por disvastigi k utiligi esp-on en maristaj medioj. Unu aktiva maristo, K-do *Carlsson* (Svedio), instruas siajn kunŝipanojn k la pasaĝerojn surŝipe ; li ankaŭ lekcias en havenurbaj esp. grupoj. La Ligon subtenas jenaj havenurbaj lab. esp. grupoj : 3-a sekcio de FLE en Roterdamo, Esp. kluboj de ABF en Gotenburgo k Malmö. La Ligo eĉ havas Sekcion en Egiptio.

Esperanto servas...

La Harlemaj esperantistoj sukcesis konvinki la estraron de « Flora 1935 » (Florekspozicio k - festo okazanta de 15. marto ĝis 19. majo en Heemstede apud Harlemo) pri la taŭgeco de esperanto. Ĝi eldonis ilustritan prospekton en esp-o k zorgis, ke troviĝu esperantista akceptejo apud la enirejo Vrijheidsdreef. Dum la daŭro de la ekspozicio la esp. rondoj organizos interkonatiĝajn vesperojn.

(J.B. Goedejohan.)

NIA POŜTO

Al kelkaj membroj. — Vi miskomprenis la aranĝon de la nuna Adresaro en la Jarlibro. Pro ŝparkaŭzoj ni ne povas aperigi la tutan nomaron ; la libro-eldono ja kostus multe tro proporcie al la pagata kotizo ! Tial aperas nur la nomoj de perantoj k funkciuloj, escepte se iu membro *krompagis* 5 fr. por la aperigo de sia nomo (relegu pri tio la unuan alineon sur la p. 9-a de la Jarlibro !).

10.865. — Ne, ni ne povas nuntempe ; nehaveblaj ĉe Pariza eldonejo.

Korespondado

Ĉeĥoslovakio.

Karaj Gek-doj, pardonu, ke mi ne tuj resp. al ĉiuj, ĉar mi ricevis tiom da koresp. petoj, ke tio ne eblas. Korege salutas vin *Jos. Stankuŝ.*

K-do *Karel Pakanol*, Emilova 38, *Plzen-Karlov*, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Francio.

K-do el Sudfrancio dez. kor. kun nur alilandaj K-dinoj. Skribu al : *Paul Doumergue*, Quartier-Bas, *Fabrègues*, Hérault.

Kanadio.

Nova SAT-ano, 29-jara, dez. kor. kun Gek-doj el ĉiuj landoj. Skribu al K-do *Gunnar Edlund*, *Spences Bridge*, B. C.

Nederlando.

K-doj *W. v. d. Heuvel*, Pieter Langendijkstr.34 k *A. Markus*, Taanderstr. 100, ambaŭ *Rotterdam (W)*, dez. kor. kun Gek-doj el ĉl. pĉt. Resp. garantiata.

5 Gek-doj dez. kor. kĉl. pri ĉt. Adr. K-dino *Anna Svensson*, K-dino *Stina Johansson*, K-do *Erik Em. Jansson ;* K-do *Harald Ohlsson*, K-do *Valdemar Kärn.* Poskesto 61, *Munkfors.* Svedio.

La *Esp. Klubo en Landskrona* aranĝos letervesperon en aprilo. Ni atendas multajn leterojn k kartojn el la tuta mondo. Resp. garantiata. Adreso : *Nils Linér*, Föreningsgatan 95, *Landskrona*, Svedio.

La Sudholanda distrikto de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj bezonas ĉiaspecajn ekspoziciaĵojn esperantajn por sia konstanta ekspozicio. Precipe afiŝoj, komerc-reklamiloj, gazetoj enhavantaj esperantan rubrikon, ktp. estas dezirataj. Tiuj, kiuj daŭre volas interŝanĝi ekspoziciaĵojn, turnu sin al la prizorganto por la Sudhol. distrikto : *P.G. v. d. Plank*, Jacob-Marisstr. 57 R, *Dordrecht*, Nederlando.

Atentu ! Atentu !

Laborista Esperanto-grupo aranĝos letervesperon ! Ĝi atendas multajn leterojn k PK el la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Oni sendu la leterojn *antaŭ* la 20-a de aprilo. Resp. garantiata Adreso : K-dino *Gerri Bootsma*, « Zonnestraal », *Hilversum*, Nederlando.

K-do *Franz Gerlach*, Am Birnstiel 7, *Jena a.d. Saale* (Germanio), deziras korespondadi kun ĉl. K-doj pri ĉt. Mi certe respondos.

Dua eldono de

HEREZAĴO

publika letero de

E. Lanti

al legintoj de « Absolutismo » ĵus aperis.

Tri ekzempleroj estas riceveblaj kontrau 1 internacia respond-kupono (Loĝantoj en Francio povas mendi po 1 ekz-o kontraŭ kvindek-centima poŝtmarko.)

Mendu al : *ESPERÂNTO*, 14, avenue Corbéra, *Paris (XII).*

6000 Esperanto-Instruistoj !

POR VIAJ INTERESOJ

aperas Internacia Pedagogia Revuo

jam en la 13-a jaro k servas al la Internacia Instruisto. Internacia informado, Internacia diskutado k Lingva perfektigilo por la esp.-instruisto ; propagandilo inter la ne-esperantista instruistaro.

La abonantoj de nia kleriga revuo ne nur havas spiritan profiton por si mem, sed ili ankaŭ helpas fortigi la TUTMONDAN ASOCION DE GE-INSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ (TAGE) k per tio subtenas la organizitan esp. propagandon inter la Instruistaro. La kotizo por TAGE k IPR (6 n-oj jare) estas 2.50 guld. aŭ 5 svis. fk. *Administracia adreso: P. KORTE*, *Schoolstr.* 13, *Veendam (Nederlando).* Poŝtĉeko 90 544, Hago.

Invito al kursfina festo.

La Lab. esp. grupo Heerlen (Nederlando) invitas en- k eksterlandajn Gek-dojn al kursfina festo, kiu okazos la 14-an de aprilo en la socialista popoldomo « De Burcht » en *Brunssum.* La kunveno daŭros de la 10-a h. mat. ĝis la 18-a h. ptm. Okazos paroladoj, teatrajoj, parolĥoro, muziko ktp. Ni provos aranĝi komunan malmultekostan buterpanan manĝon tagmeze. Partoprenontoj anoncu sin frutempe ! Sciigu, ĉu vi volas partopreni la komunan manĝon k ĉu vi intencas veni jam sabate. Nur ĉe sufiĉe frua sinanonco ni povos zorgi pri senpaga tranoktado. Post anonciĝo vi ricevos pluajn informojn, Skribu al : *J. Sterken*, Vorstenstr. 60, *Heerlen*, Nederlando.

K-do *G. Steensel*, Pansierstr. 27, *Scheveningen*, Nederlando, kolektadas poŝtmarkojn por pli rapide presigi la Brajl-vortaron por la blinduloj. Ju pli baldaŭ oni sendas, des pli baldaŭ li sukcesos.

Subskribinto, sekretario de la Holanda sekcio I.F.E.T.T. k de la propaganda komitato, turnas sin ĉi tie al la tut-monda esperantistaro por havigi al si ĉion, kio povas esti konsiderata bona propagandaĵo, kiel gazetoj, ilustritaj kartoj, afiŝoj, fotoj, bildoj ktp, por okazigi intensan propagandon en Holando por esperanto. Volonte li ricevos de ĉiu sendaĵo po 2 ekz-oj. Al ĉiu sendint(in)o de io ajn, li garantias certan respondon Esperante, ke li povas kalkuli je ĉies kunlaboro, li jam anticipe kore dankas la sendontojn. — *A. Damsteeg*, *Puntstraat* 55*b*, *Rotterdam*, Nederlando.

La 14-an de aprilo ni aranĝos kursfinan feston. Sendu multajn PK k let. por niaj 100 komenc. k progresintoj. Ni estas Gek-doj ĉiuaĝaj k dez. kor. kĉl. pri ĉ.t. Unufoja resp. gar. Skribu al *J. Sterken*, Vorstenstr. 60, *Heerlen*, Nederlando.